Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO kaj multo pli

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2016-30 sendita el Budapeŝto, la 8an de novembro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj.

## AMO proksimiĝas denove

La 28a Seminario pri Aktivula Maturigo okazis kadre de la Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) inter la 17a kaj la 20a de novembro. La temon de la Konferenco dividas la AMO-seminario: *Avantaĝoj kaj obstakloj de moderna komunikado*. Jen la nunaj imagoj pri la seminaria enhavo:

- La Jaro de la Lernanto – prezento kaj grupdiskuto (Stefan MacGill)
- Vikipedio praktike – lernu aktive kontribui (Michal Matúšov – KuboF, Václav Zouzalík)
- Grafikaj programoj – iĝu grafikisto facile kaj rapide (Edoardo Nannotti, Peter Baláž)
- Diversaj Guglo-programoj kaj kiel praktike utiligi ilin (gvidantoj elektotaj).

La 29a AMO seminario okazos kadre de la 6a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE); findecido pri la gvidontoj daŭras.

## Kurso en grava pariza lernejo

Tion starigis la dano Jesper Lykke Jacobsen, kiu mem instruas fizikon en tiu supera kaj prestiĝa lernejo, renoma tra la tuta Francio. Li skribas: "Post longa klopodado fare de entuziasmuloj nun oficiale malfermiĝis Esperanto-kurso en la Lingva Departemento de *École Normale Supérieure* (ENS, Parizo), malfermata por ĉiuj studentoj, instruistoj kaj vizitantoj de tiu institucio. Laŭ niaj arĥivoj estos la unua fojo, ke Esperanto-kurso okazas en ENS. Mi zorgos pri la instruado de tiu kurso. Ekzistas jam projektoj daŭrigi la kurson dum pluraj jaroj kaj eventuale dissemi ĝin al aliaj francaj institucioj pri supera edukado. Jen pliaj informoj

http://www.ecla.ens.fr/spip.php?article179&var_mode=calcul

Por prepari la kurson, mi kompreneble havas amason da materialo ĉe mi kaj en la reto. Sed pri la aĝogrupo (ĉefe junuloj de 20-25 jaroj) mi pensis, ke eble mi povus ankoraŭ trovi kelkajn taŭgajn tekstojn."

Do, se vi havas allogajn bonkvalitajn tekstojn, sendu ilin al mi (smg) kaj mi plusendos ilin.

Vidu raporton en la oktobra numero de revuo *Esperanto*, p. 200, kun foto.

## Eksteraj Rilatoj – Koreio denove elpaŝas nome de UEA




Busan estas urbo – la dua en Koreio – kiu figuras kaj figuros signife sur nia verda mapo. UEA montris sin aktive en Konferenco tie, kaj en la sekva jaro ĝi gastigos la 50an jubilean Kongreson de ILEI.

Temis pri la 4-a regiona konferenco de la Unio de Internaciaj Asocioj (UIA), okazinta  fine de septembro en Busan, Koreio, kun la nomo Asocia Ronda-Tablo Azio-Pacifiko. Partoprenis tripersona delegacio de UEA, kiu formis valorajn kontaktojn kaj vidigis niajn asocion kaj lingvon. Jen bildo de la dulingva flugfolio, kiun oni disdonis en la aranĝo.

Vidu raporton en la oktobra numero de revuo *Esperanto*, p. 206, kiu montras foton de la E-teamo kune kun aliaj partoprenintoj.

## Raportu viajn kursojn nun!
## Rekontrolu viajn informojn!

Jam de pli ol dek jaroj, ILEI kaj UEA kune anoncas, ofte kaj regule, ke la oficiala kolektejo de informoj por tiuj du organizoj pri E-kursoj troveblas che <edukado.net> kie ĉio raportita aperas en tabela formo kaj en formo de interaktiva mapo. La tabeligo estas ordigebla, filtrebla por doni maksimuman flekseblon en la trovado de specifaj informoj. Iru al <edukado.net> kaj elektu "Kursejo". Tie eblas vidi la listigon kaj mem enskribi siajn kursojn aŭ anonci sin kursgvidanto. La retejo disponigas forumon por interklasaj kaj interinstruistaj kontaktoj.

## Frua Zamenhof-festo en Berlino

Ni invitas ĉiujn al agrabla kunestado dum la ĉijara jarfina, Zamenhofa kaj librofesto. **Loko**:  *Kietzspinne* - Oranĝerio, Schulze-Boysen-Straße 38, DE-10365 Berlin. **Tempo:** Vendrede, la 25an de novembro 2016, 15:00-20:00 h.  **Provizora programo:** Malfermiĝo/festprelegeto, Salutvortoj de gastoj, Fritz Wollenberg: „Filmo pri la somera festo sur Esperanto-placo Berlin“; Werner Pfennig: „Spertoj pri denaska instruado de Esperanto“; Ronald Schindler: “Vojaĝo al dumvintra Brazilo“; Libroj – viaj amikoj (filmeto de 15 minutoj).  Babilado, Libroservo funkcios dum la tuta tempo.

## Informado en Togolando

Estas kelkaj afrikanoj, kiuj volas kaj laŭ siaj rimedoj elpaŝas amaskomunike pri Esperanto en la kontinento. Nur eble oni ne sufiĉe raportas pri tio. Gazeto en Togolando raportis pri la UK en Nitro pro laboro de afrikano. Komence de la ĵus pasinta oktobro dum sia vizito en Togolando la Ĝenerala Direktoro de UEA kaj mi partoprenis en programoj de televido kaj radio. Ambaŭ elsendkanaloj estas tutnaciaj kaj atingeblaj tutmonde per satelito. Pro tiuj niaj programoj estas nun deko da enlandanoj por lerni Esperanton. Multaj el ili loĝas meze kaj norde de Togolando, kie nia lingvo ankoraŭ ne enhejmiĝis. La delegacio de UEA/TEJO tiam povis ankaŭ kunveni kun la Vicministro pri Kulturo danke al klopodoj de lokanoj.

Estas instanco en Afriko kiu prizorgas la aranĝon de reklamoj pri Esperanto en gazetoj, amaskomunikiloj, sociaj retejoj, kie pli kaj pli facilas atingi novulojn. Sed oni ne atendu grandan miraklon se ĉiufoje afrikanoj mem devas pagi tiujn programojn, pro propraj limgitaj rimedoj. UEA devas subteni finance tiujn aktivaĵoj, kion ĝi ĝis nun ne faras, bedaŭrinde!

Adje Adjevi

## Biblioteka progreso

Ni atentigas vin pri la nova retejo de la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Kolekto por Planlingvoj:

http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/

Esperantomuzeo: http://www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo/

Pli mallongaj tekstoj, pli da bildoj kaj konciza strukturo zorgu, ke vi facile kaj rapide ricevu deziratajn informojn, kiujn vi bezonas por viaj laboroj en la biblioteko aŭ por via vizito en la Esperantomuzeo.

Ĉi-kune mallonga superrigardo pri la plej gravaj ŝanĝoj:

- La retejo estas plibonigita, por ke vi povu klare legi ĝin sur diversaj iloj kiel (poŝ)komputiloj, tabulkomputiloj kaj saĝtelefonoj.
- Pro la nova menuo vi atingas pli facile la digitajn dokumentojn de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo – librojn, periodaĵojn, dokumentojn pri la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj pri la unua mondmilito.

Libroj: http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/libroj/

## Revuo Esperanto

La septembra numero aperis rete; sekvos la fizika dissendo. La oktobra numero kuŝas ĉe la enpaĝigisto, artikoloj por la novembra numero estas aktive arigata kaj trairas lingvan kontrolon. Mi ekrespondecis pri la revuo antaŭ monato (en la 5a de oktobro), sed mia ankoraŭ ne havas aliron al la oficiala revua retadreso. Do, se vi sendas kontribuaĵon aŭ havas demandon aŭ komenton, bv. sendi tion (dumtempe) al mia privata adreso: <stefan.macgill<ĉe>gmail.com, laŭeble kun temlinia titolo, kiu komenciĝas per “RE”.

Vortoj:966.

Pardonu pro la longeco, sed kun revuaj devoj, neeblas tiom regule aperigi EKO-komunikojn.

=============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

PDF farita de Nuance Power PDF.